

Esperanto-instruado en Hungario.  
Intervjuo de Walter KLAG kun Katalin SMIDÉLIUSZ  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.10.24 - 26

CL.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. La pasintan semajnon ni anoncis, ke Walter KLAG en Vieno, Aŭstrio, sendis interesan intervjuon, kiun li realigis en aprilo kun sinjorino Katalin SMIDÉLIUSZ instruanta Esperanton en Hungario. Jen hodiaŭ ni legas al vi tiun tekston. Mi mem ludas la rolon de Walter KLAG, la demandanto, kaj mia edzino anstataŭas la respondantinon Katalin SMIDÉLIUSZ. La unua demando de Walter KLAG estis: "En kiu lernejo vi instruas?"

A.- Katalin SMIDÉLIUSZ respondis: "Mia altlernejo situas en Szombathely, okcidenta Hungario, kaj estas frekventata de 18 ĝis 23-jaraj gestudentoj, kiuj jam trapasis la abiturientan ekzamenon. En la kvarjara studado ili fariĝas diplomitaj instruistoj por ĝeneralaj lernejoj, popolklerigistoj aŭ bibliotekistoj. Ĉiu studento havas du fakojn, la plej kapablaj rajtas elekti en la tria jaro ankaŭ unu plian fakon. Mia altlernejo havas 1600 studentojn, sed paralele funkcias ankaŭ koresponda edukado. Nun estas periodo de rapida ŝanĝo, tial la estraro pretas subteni ĉian racian kaj praktikan planon.

CL.- Ĉu tio koncernas ankaŭ la internacian lingvon?

A.- La politika ŝanĝo kaŭzis veran eksplodon en la lingvo-instruado. Ĝis antaŭ du jaroj la studentaro en la unuaj du jaroj devige lernis la rusan lingvon, kaj funkciis nur malmultaj lingvo-kursoj pri la aliaj lingvoj. Jam tiam mi instruis Esperanton al interesigantoj. Depost la reformoj la studentoj rajtas elekti inter dek lingvoj, kaj post kvar-semestra studado ili devas ekzameniĝi pri la elektita lingvo. Esperanto egal-rangas kun la aliaj lingvoj. Laŭ la intereso de la studentoj ĝi okupas nun la kvinan lokon post la germana, angla, itala kaj latina, kiu estas deviga por historiistoj.

CL.- Kiel vi provas entuziasmigi viajn studentojn por Esperanto?

A.- Mia celo estas ne nur instrui la lingvon. Jam de la komenco mi klopodas eksentigi al la kursanoj la esencon de nia movado kaj ekflarigi la esperantistecon. Bone efikas rakontoj pri mia propra sperto, ekzemple fruaj korespondaj kontaktoj, renkontiĝoj kun esperantistoj, revuoj kaj ekspozicioj.

CL.- Ĉu vi alfrontas ankaŭ kritikojn?

A.- Mi spertis, ke miaj studentoj ofte fieras pri sia esperantisteco kaj la aliaj ne nur toleras tion, sed ankaŭ interesiĝas pri nia agado. Aliflanke la fakto, ke oni povas instrui la lingvon sen iu ajn tiudirekta edukiteco ŝajnis kelkfoje nian lingvon ne tre serioza afero.

CL.- Kvankam ekzistas esperanto-fako en la budapeŝta universitato ELTE ekde 1966?

A.- Bedaŭrinde nur malmultaj diplomigintoj en ELTE fariĝas instruistoj pri la lingvo. Ĝis nun la diplomo estas "nur" prelegista kaj ne instruista. Kaj nur en ekstremaj kazoj oni dungigas en ĝenerala lernejo kun universitata diplomo. Por tia lernejo nia altlernejo edukas la instruistojn.

CL.- Kiom da studentoj vi havas en Szombathely kaj kion ili konkrete lernas?

A.- La esperanto-fako ĉe ni funkcias ekde la studo-jaro 1990/91, en kiu mi havas 70 gestudentojn, kiuj studas Esperanton kiel devige elekteblan fremdan lingvon. Kadre de la kvin-semestra edukado la studentoj okupiĝas pri praktika kaj priskriba gramatiko, literaturo, interlingvistiko, movad-historio kaj metodologio de la lingvo-ekzercado. Nia ĉefa celo estas, ke la studentoj supergrade regu la lingvon kaj tre bone konu la metodikon de la lingvo-instruado. Por tiu celo ni funkciigas infangrupon, kie ili unue nur observas la instruadon, sed poste kun respondeco partoprenas la laborojn, gvidas studhorojn. Por akirigi al ili sperton pri la plenkreskul-instruado ili havas praktikon ankaŭ en la altlernejo instruante studentan grupon. Post la fino de la studo ili ŝtate ekzameniĝos kaj iĝos oficiale instruistoj por ĝenerala lernejo pri esperanta lingvo kaj literaturo. Estus bone jam vidi la unuan tian diplomon!

CL.- Kiel vi venis al Esperanto?

A. Meze de la sepdekaj jaroj mi esperantiĝis ĉe Blazio VAHA en nia altlernejo. Pro iuj problemoj mi ĉesigis la esperanto-studojn, sed mi sciis, ke mi iam ellernos, eĉ instruos la lingvon. Unue mi aŭtodidakte lernis, poste akiris la movadan C-diplomon pri instruado. Pasintan jaron mi finis la studojn en la esperanto-fako de ELTE en Budapeŝto. Antaŭ la diplomigo mi havis la eblecon staĝi en Kultura Centro Esperantista en Svislando kaj tiuj du monatoj forte difinis mian pluan taskon. Mi multon lernis de s-ro Claude GACOND, sukcese submetiĝis en La Chaux-de-Fonds al la pedagogi-metodika ekzameno de ILEI/UEA ĉe s-ino Irena SZANSER kaj trovis en tiu urbo multe da amikoj el la tuta mondo, sen kies amikeco kaj instigo mi kelkfoje ne plu havus forton daŭrigi la jam komencitan aferon.

CL.- Kian helpon vi bonvenigus por la estonteco?

A.- Nia fako absolute ne disponas pri mono, eĉ la poŝto-kostoj estas ege limigitaj. Por instrui ni nepre bezonus librojn, por ke ni ne nur lernu pri la originalaj verkoj de la esperanto-literaturo, sed ankaŭ havu la eblecojn legi, trastudi ilin... Signifan librodonacon ni ricevis de la landa asocio, sed temis pri la novaj nun aĉeteblaj libroj, mankas la malnovaj. Eĉ uzitaj libroj estus bonvenaj por nia nun kreskanta biblioteko. Ĉefe interesus nin lernolibroj uzataj en diversaj landoj por studi ilian metodikan strukturon, vortostokon ktp. Ni volonte akceptus ankaŭ ekzemplerojn de gravaj esperanto-revuoj por esti informitaj pri ilia agokampo kaj pri movadaj aferoj. Tre valora estis ankaŭ vizito de s-ro Tazio CARLEVARO el Svislando, kiu multe kontribuis al la decido de nia altlerneja estraro rilate esperanto-instruadon. Estus ankaŭ bone, se miaj gestudentoj, same kiel mi ĉe Kultura Centro Esperantista, havus la eblecon ie eksterlande ekflari ian esperantistan etoson. Ili kapablus helpi en instruado, zorgi pri infanoj, labori per komputiloj, katalogi libron, multloke utili per Esperanto. Kial ne?"

CL.- Per tiuj vortoj finiĝas la intervjuo, kies alvokon al ricevo de dokumentoj libraj kaj revuaj ni ripetas. Donacemuloj sin anoncu tra la kanalo de Svisa Radio Internacia kaj ni transdonos ai ili la adreson de s-ino Katalin SMIDELIUSZ.

A.- Tiu intervjuo klare reliefigas la nuntempan esperanto-problemaron. Estas malfacile gvidi superan instruadon de Esperanto sen kontakto kun esperanto-biblioteko kaj se la lernantoj ne havas la eblecon kontaktiĝi per staĝoj kun movadaj institucioj.

CL.- Sinjorino Katalin SMIDÉLIUSZ havis tiurilate ŝancon, ĉar Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds dediĉis parton de siaj financaj fortoj al la invito de staĝuloj, kiuj povis lertiĝi en la lingvo-praktiko helpante ne nur al la lingvo-instruado, sed ankaŭ al la organizo de vesperoj kaj por administraj kaj servaj taskoj.

A.- Ĉu la rareco de staĝebloj por esperanto-studentoj iel respegulas neglektemon al la junularaj bezonoj fare de nia movado?

CL.- Tutcerte jes. En la agad-planoj kaj buĝetoj de niaj organizaĵoj preskaŭ nenio aŭ tre malmulto ekzistas por junularaj celoj. Eĉ UEA apenaŭ subtenas finance la aktivecon de sia junulara sekcio TEJO, kiu pro tio konstante travivas krizojn, kaj mi ne konas landan organizaĵon, kiu dediĉas monon al la organizo de iom originalaj aktivecoj porinfanaj, porjunularaj kaj porstudentaj. Tial esperanto ne altiras eĉ la propran junularon kaj la esperanto-socio maljuniĝas, kadukiĝas eĉ! Sufiĉe maltrankviliga situacio.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andree GACOND, kiuj remalfirmos sian leterkeston la venontan semajnon. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*